

NIA VOĈO
Madrída Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4^oB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

JUNIO 2002

TORRES QUEVEDO, ESPERANTISTA

Konsultante la biografion de Leonardo Torres Quevedo, ligo kun mia esploro pri Emilio Herrera, mi trovis ke ĉi tiun jaron oni festos la 150-jaran datrevenon de lia naskiĝo, je la 28a de decembro. Mi supozas ke oni aranĝos ion festante la daton, kvankam mi ankoraŭ eksciis pri nenio. Eble tio estus bona momento por informi pri lia esperantisteco.

Mi scias ke li lernis esperanton, kaj ke li partoprenis la Internacian Konferencon pri la Aplikado de Esperanto en la Sciencoj, en 1925 en Parizo, kune kun Herrera kaj Vicente Inglada, komisiita de la hispana Ministerio pri Edukado. Sed mi ne scias ion plian pri lia aktivado esperanta. Ĉu iu konas ion kaj povas min informi? (Tonyo del Barrio laboras en diversaj flankoj rilate biografioj de eminentaj esperantistoj)

URBESTRO DE MADRIDO ESPERANTISTA

Cayetano Redondo Aceña estis socialista parlamentano dum la respubliko, urba konsilanto dum pluraj jaroj, ĉefredaktoro de la socialista ĵurnalo "El Socialista" kaj fine, dum parto de la milito, urbestro de Madrido. Li estis mortpafita je la fino de la milito. Li estas unu el la malmultaj madridaj urbestroj kiu ne havas straton al li dediĉitan en tiu urbo. Ĉu iu scias ion plian pri lia vivo? Eble ni povas fari ion por lin honorigi.

Pliajn informojn: Li naskiĝis la 7an de agosto de 1888 en Segovio. Li estis mortpafita ĉe la muroj de la madrída Almodena-tombejo la 21an de majo 1944. Li estis urbestro de novembro 1936 ĝis majo 1937. Poste li estis prezidanto de la madrída provinca deputitaro. Do li iel estis antaŭulo de la prezidanto de la nuna madrída aŭtonoma regiono. Li ankaŭ estis dum sia junaĝo fondinto de madrída socialista junularo.

Se iu havas kontaktojn kun la madridaj socialistoj, estus bone se oni parolu al ili pri tiuj ĉi cirkonstancoj. Mi mem provos. (Tonyo del Barrio)

FRANCISCO AZORIN, PARLAMENTANO

En la libro "El grupo parlamentario socialista en la Segunda República: estructura y funcionamiento", verkita de Aurelio Martín Nájera, eldonita de la Fondaĵo Pablo Iglesias (Madrid, 2000), aperas aldonaĵo kun biografio de ĉiuj socialistaj parlamentanoj tiuepokaj (el tie mi prenis la donitaĵojn pri Cayetano Redondo, de la apuda mesaĝo).

En la biografio de Francisco Azorín Izquierdo, aperas jeno: "Promotor del esperanto, organizó el III Congreso Ibérico Esperantista celebrado en Córdoba en mayo de 1925. Escribió un método para el aprendizaje de esta lengua, "El esperanto en diez lecciones", y un diccionario de terminología arquitectónica comparada en seis idiomas -inglés, francés, italiano, alemán, español y esperanto - publicado en 1932 con el título de "Universale (tiele!) Terminologio de la Arkitekturo". Durante años colaboró en "El Socialista" con una columna titulada "Notas Esperantistas"... Exiliado en México, (...) fue presidente de la Asociación Esperantista de México" (Tonyo del Barrio)

LETERO DE JACQUES CHIRAC

Jacques Chirac tiel respondis, la 15-an de aprilo, al retmesaĝo de Vincent Charlot : Kara Sinjoro, Vi bonvolis altiri mian atenton pri la problemo de Esperanto, kaj mi dankas vin pro tio ĉar, kiel vi jam scias, temas pri afero pri kiu mi estas sincere favora.

Eĉ se pro kialoj kiujn vi facile komprenos, mi deziras antaŭ ĉio min dediĉi al la defendo de la francparolantaro, mi havas profundan simpatian por Esperanto kaj la humanista projekto kiu direktis ĝian kreiĝon kaj kiu pli ol iam ajn animas ĝiajn hodiaŭajn defendantojn.

Mi opinias miaflanke, ke la progresado de Esperanto, en la respekto de la kultura diverseco, kiu estas nedisigebla de ĝi, estus potenca faktoro de harmonio kaj kompreniĝo inter la popoloj.

Estas tute sendube ke, se la sorto de la urnoj estos al mi favora, mi submetos al la venonta registaro, kaj aparte al la ministro de la nacia Edukado, la demandon pri ĝia inkludado kiel elektebla lernobjekto en la abiturienta ekzameno, aparte pro la deziroj esprimataj fare de la gelnantoj kaj gepatroj, kaj pri la ebleco varbi sufiĉe da kompetentaj ekzamenantoj.

Mi petas vin kredi, Kara Sinjoro, je la esprimo de miaj plej bonaj sentoj. Plej kore.
[manskribite] Jacques Chirac

UGT jam bonvenas en Esperanto!. La tt-ejo estas www.ugt.es

HIMNO AL EŬROPO

Ni proponas tiun ĉi tekston, laŭ la muziko de la 9a simfonio de Beethoven (Himno al la ĝojo) kiel himnon de la unuigita (aŭ unuigenda) Eŭropo. Esperantaj vortoj de Umberto Broccatelli

Kantu kune amikaro, ni la ĝojon festas nur, nek rivero nek montaro plu landlimoj estas nun. Ho Eŭropo, hejmo nia, tro daŭradis la divid'. Nun brilegu belo via, ĉiu estas via id'. Via flago kunfratigas	homojn post milita temp', via leĝo nun kunigas civitanojn en konsent'. Sub la ŝildo de la juro ni vivados en konkord'. Tio estas nia ĵuro: unu land' kaj unu sort'. Tra l' Malnova Kontinento nun laŭtiĝu nia kant',	flugu per facila vento en la lingvo Esperant'! Jen ekzemplo por la mondo: jen direkto, jen la voj': tuthomara granda rondo en la paco, en la ĝoj'!
--	--	--

HEF ANGULO

Fernando Moral akceptis la funkcion ĉefdelegito de UEA por la periodo 2002-2004. Lia tasko konsistas en la kunordigo de la delegita reto de UEA en Hispanio.

Pedro A. Garrote, el Valladolid, estos la nova kotizperanto de UEA en Hispanio, funkcio ĝis nun farita de la CO de HEF. Temas pri perado de pagoj por membrokotizoj al UEA, abonoj al la revuoj "Esperanto" kaj "Kontakto" kaj aliĝoj al UK.

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

1a-7a julio. Internacia SAT-kongreso. Alicante.

11-18 julio. HoRo. Hispana Renkontiĝo (HEJS). Salamanca.

1a-4a aŭgusto. 62-a Hispana Esperanto-Kongreso. Alicante.

<http://www.infonegocio.com/augustocasquero>

23^a-28^a aŭgusto Eŭrop-unia Kongreso. Verona (Italio) "Efectiva lingva egaleco: rajto de la eŭropano"

24^a- 31^a aŭgusto. 28-a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo. Sète (Francio)

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

EN JUNIO niaj konversaci-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h,
en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4ºB. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal